2-a Jaro, N-o 33 (85)

APERAS S.A.T. SEMAJNE

13. Majo 1926

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

# SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

Sidejo de la Redakci-Komisiono: Colmstrasse 1, Leipzig O 27 (Germanio)

Sidejo de Ekzekutiva Komisiono de SAT 23, rue Boyer, Paris XX

Administranto: R. LERCHNER Colmstrasse 1, Leipzig O 27

## Problemo de Brita Karb-Industrio

Okazis granda konflikto inter la ministoj kaj la posedantoj. En majo, kiam la nuna interkonsento finiĝis kaj la registaro devis rekonsideri, ĉu ĝi daŭrigos aŭ ne la nunan subvencion.

La industrio havas proprajn kvalitojn, kiuj diferencas ĝin kiom eble plej multe de ĉiuj ordinaraj industrioj. Ĝi estas sub diversaj naturaj aŭ geologiaj influoj, kiuj ebligas, ke unu firmo akiras troan profiton dum la aliaj apenaŭ "povas pagi sian vojon". Ni studas tiun ĉi industrion por esti informataj pli precize pri ĝiaj problemoj.

En ĉiu karbo-distrikto la tavoloj de karbo estas malsimilaj. En unu ĝi povas esti 6 colojn dika, dum en aliaj ĝi povas atingi dikecon de 7 aŭ pli da futoj.

La karbo multfoje lokiĝas profunde en la tero kaj por atingi ĝin, oni devas elfosi ŝaktojn; ju pli profunda estas la karbo des pli kosta estas la konstruado de tiuj ŝaktoj, kelkaj atingas unu kilometron sub la suprajo.

La tero, kiu kuŝas inter la tavoloj de karbo povas esti aŭ kompakta aŭ malkompakta, kaj de tio dependas, ĉu estas bezonataj multe aŭ ne da traboj por apogi la plafonon.

La karbo-tavolo ne daŭras seninterrompe. Multfoje okazas kreviĝo, ke la tero en unu parto aŭ leviĝas aŭ malleviĝas, kaj pro tio ankaŭ la karba subtavolo ŝanĝas sian lokiĝon rilate al la proksima parcelo de tero.

La ministoj hakas la karbon ĝis ili atingas ŝtonaĵon, kiu ne estas el karbo, sed nur el ordinara tero. La karba tavolo kelkfoje haltas subite kaj la spertulo devas esplori, ĉu ĝi leviĝas aŭ male.

Eĉ, se la tavolo estas senintermanka, tio ne ĉiam daŭras sur horizontala pozicio, sed kun la fleksiĝo de la apuda tero, ĝi ankaŭ fleksiĝas aŭ suden aŭ supren.

La tavolo povas fleksiĝi kaj supren kaj pli malsupren kaj rompiĝi en kelkaj lokoj por komenci denove en pli alta aŭ malalta pozicio rilate al la antaŭa nivelo.

Se la tavolo malsupreniras tro profunde, povas okazi, ke la posedanto konstruigos novan ŝakton por pli facile atingi la karbon, kaj tiu laboro eble daŭras por unu jaro.

En diversaj distriktoj la karbo diferencas en kvalito. Unu pli taŭgas por gaso, alia por vaporo aŭ oleo.

Post kiam la gaso estas eltirita el la karbo, la postlasita koakso estas utila por la fabrikejo de ŝtalo. Sen koakso oni ne povas fabriki ŝtalon. Tiamaniere oni aplikas la diversajn karbo-kvalitojn plej ekonomie.

Lastatempe oni enkondukis mekanikajn aranĝojn al la akiro de karbo por anstataŭi la homan energion. Oni tranĉas la tavolon per maŝina tranĉilo kaj poste enmetas la dinamiton por diskrevigi kaj maldensigi la karbon.

Apude oni kuŝigas serion de skatoloj aŭ kestoj sur fera rimeno ĉiam moviĝantaj en kiujn la ministo metas la karbon, kiun ĝi forportas mekanike al la ĉefa aleo. Ĝi estas iom simila al la moviĝantaj ŝtuparoj, kiuj funkcias en la londonaj subteraj vagonar-sistemoj. Ofte la "conveyor" ne ĉirkaŭiras, sed nur skuas la karbon antaŭen de ferplato al plato kaj fine en la vagoneton. Oni eĉ uzas mekanikajn ŝovelilojn en entreprenoj, kiuj estas plej modernaj kaj estas pli uzataj en Usono ol en Britio.

Por eluzi la karbo-tavolon, oni uzas la "Pillar kaj Stall"-metodojn, t. e. oni tranĉas la tavolon en multaj kvadratoj, kaj unu estas tiam dehakita, oni almetas trabojn por apogi la supran teron. Tio estis tre frua metodo kaj ne ofte uzata.

Alia metodo estas la "laŭtavola progresanta metodo", laŭ kiu oni tuj komencas ĉe la ŝakto elhaki la karbon, kaj formas ĉefan aleon, kiu ambaŭflanke havas trabojn por subteni la supran tavolon.

La plej moderna, sed ne ofte uzata metodo, estas nomata la "laŭtavola retroiranta metodo". Laŭ tiu, la ministo dehakas ĉefan vojon kaj poste forprenas la karbon de la plej malproksimaj lokoj, tiel, kiam oni forprenas la karbon, ne estas necese konstrui subterajn trabojn, 98 % el kiuj venas ĉefe de Francio kaj Norvegio.

En la subo de la ŝakto, la ministoj devas ofte marŝi ĝis 2 1/2 mejloj (proks. 5 kilom.) por atingi la laborlokon, tio signifas egan malŝparon de kvalifika laborkapablo. Tamen en Usono, ĉar la karbo-industrio, kompare kun la brita, estas nova, la ministoj bezonas nur iri ĝis 10 jardoj (9 m.) por atingi sian laborlokon, ĉar la aĝo estas alia.

En la distriktoj Nord-Humberlando, Cumberland kaj Sud-Stafordŝiro ankaŭ en Skotlando, la karbokampoj estas tre malnovaj kaj estas pro tio tre koste eltiri la karbon.

En Cumberland la tavolo etendiĝas de 3 ĝis 4 mejloj sub la fundo de la maro, laŭlonge la marbordon por 12 ĝis 15 mejloj, restas ankoraŭ multe da karbo sed estas pli malfacile atingi ĝin.

En la distriktoj, Sud-Yorkŝiro (Warrickshire) Worakŝiro kaj Kento la karbo-kampoj estas en la maturo de juneco. Ne necesas timi la eluzon de la karbo-provizo, ĉar ĝi povas daŭri por 3 mil. jaroj.

En Usono, la kosto por havigi karbon estas nur 1/2 ĝis 1/3 de tiu en Britio, sed ĝia provizo ne serioze konkuras en la mondmerkato, ĉar la karbokampo estas almenaŭ 100 mejloj for de la marbordo.

Antaŭ la milito la eksporto de karbo el Britio estis 1/3 de la tuta produktado. Sed nun ĝi estas 1/4 kaj lastan jaron atingis 1/5.

Usono eksportas karbon al Sud-Ameriko kaj Brazilio, sed ĉar ĝi produktas ĉion hejme, ĝi ne bezonas aĵojn el alilando, pro tio la ŝipoj revenas ne plenaj kun oleo kaj kaŭĉuko, kaj la frejtoj estas multekostaj; pli ol ili estas por la britaj komercŝipoj, kiuj iras ambaŭvoje kun plena ŝarĝo.

Ĉar 1/3 de la brita karbo estas por eksporto, estas videble, ke 1/3 de la ministoj dependas je tio por sia vivsubteno. Estas proksimume 1 miliono da ministoj, t. e. 3 centmil dependas je la eksport-komerco.

La pacarangôj minacis la vivon de la britaj ministoj spite tio, ke la angloj laŭ fanfarono venkis en la milito ĝi efektive nun suferas pro tiu venko.

La venkintoj forprenis la karbo-provizojn de Germanio — ĝi produktis novajn provizojn — lignito kaj ekonomie produktas elektropovon. Anstataŭ ruiniĝi, Germanio gajnis. Tiu forpreno nur stimulis ĝin por esplori novajn kampojn. Francio havigis la provizon de Germanio, estas nur la britoj, kiuj perdas. Ne forgesu pri la germanaj karbministoj, kiuj perdis multajn rajtojn.

Skandinavio uzas elektron. Ĉilio kaj Sud-Ameriko uzas oleon por la petrolmaŝinoj.

La britaj karbministoj suferas ĉefe pro: 1. industria krizo, kiu influas ĉiujn industriojn kaj ne estas ĉiama, ĉar 2. aliaj landoj ricevas karbon senpage de Germanio, kiel riparad-pagon, ĉar 3. aliaj landoj havigas sian propran karbon aŭ anstataŭaĵojn kaj pro tio ne bezonas la britan karbon.

Oni atendas, ke Francio ne nur ne importas, sed kiam venos 1928 ĝi siavice eksportos karbon. Estas la unuan fojon, kiam iu granda industrio estis sub minaco tia granda. La spertuloj por la ministoj konsilas a) rifuzon konsenti je malaltigo de salajro, b) naciigon de la industrio kaj plenan utiligon de la flankaj produktoj. Nuntempe proksimume 80% de la valoraj elementoj en la karbo estas forbrulita en la ordinara fajro kaj suprenflugas tra la kamentubo.

Oni intencas c) utiligi 100% el la enhavo de la karbo por eltiri tiajn produktojn, kiel gason, gudron, amonion ankaŭ eksplodaĵojn, kolorigaĵojn ktp. Tiu propono estas nomata "la karbonigado je malalta temperaturo".

Ankaŭ la spertuloj konsilas d) la starigon de kelkaj ĉefaj elektro-stacioj tra tuta lando.

Tiel oni ekspluatos la industrion laŭ scienca plano.

La nunaj posedantoj postulas pro la uzo de la tero ne nur tantiemojn (sume 6 milionoj da sterlingoj) sed ankaŭ (wayleaves) vojopermesan pagon.

Supozu, ke estas 3 apartaj parceloj da tero, kiuj apartenas al tri apartaj posedantoj. Se la karbo-aleoj etendiĝas sub ĉiuj tri, sed atingos la supraĵon de la tero nur je la unua, tiam ĉiuj apartaj posedantoj postulas siajn apartajn impostojn de la akirita karbo.

La eklezio ankaŭ posedas teron tiaspecan kaj ankaŭ postulas rabaĵon (sume proks. 4 centmil sterlingojn).

Ilia prediko havas iom da substanca vero. Kiam ili diras: "La tero kaj la tuta ĝia enhavo apartenas al la Sinjoro."

Nu, ni vidos, kion rezultigos la ĝenerala striko. *I. Floro 3398.*

## Novaĵoj el Ameriko

Ĉe Tampa, haveno en suda parto de Usono, dum strik-afero sur la vaporŝipo Barbara, policano nomita Gullette surŝipiĝis kaj arestis la tutan ŝipanaron, ligante la arestitojn duope per fermanumoj. Unu el la arestitoj, jam ligita al alia, nomita Hans Pettijohn, norvego, riproĉis la policanon pro lia bruteco, kaj la policano tuj mortigis lin per pistolo. La juĝisto liberigis la policanon dirante, ke li estis pafinta por memdefendo, malgraŭ la kadavro de Hans ankoraŭ estis ligita al la vivanta kunulo kiam oni portis ĝin surteren. Nesciante, kie en Norvegio loĝas la parencoj de Hans, oni enterigis lin ĉe Tampa. Eble per Esperanto ili scios pri la malĝoja afero.

*

Nova leĝo en Guatemalo sendas strikantojn al la malliberejo por 8 jaroj, kaj strik-pikedojn por 2 jaroj. Se iu estos mortigita kiel sekvo de striko, oni akuzas la tutan strikantaron esti la mortigintoj. La militistaro administras tiun leĝon. Guatemalo estas unu el la plej reakciaj lokoj en Ameriko. Usona financo funkcias tie por kontraŭstari la kreskantan laboristan movadon en Meksikio.

*

La Canadian Teachers Federation (Federacio Kanada de Instruistoj) kunvenos ĉe Charlottetown, Prince Edward Island, Canada, 3. aŭgusto por kvartaga kunsido.

*

La striko de teksistoj en ŝtato New Jersey, Usono, jam konsistas el pli ol 16000 personoj kaj ankoraŭ kreskas. Kiam oni volis fari fotografaĵojn por montri la brutecon de la policanoj, tiam la policanoj detruis la kamerojn kaj batis la reprezentantojn de la gazetoj. *1781.*

## Kantonaj novelektoj

En pluraj kantonoj de Svisio okazas dum ĉi-printempo novelektoj de la kantonaj parlamentoj. Kaj la laboristaro konstatas, ke ne nur en la naturo sentiĝas la printempo, sed ke ankaŭ printempa vento plivigligas la laboristan movadon.

La unua kantono en kiu okazis la novelektoj, estis la agrarkantono *Thurgau* en nordoriento de Svisio. En la antaŭa parlamento la socialistoj okupis el 136 mandatoj 18. La nova parlamento nombras 140 deput., el kiuj la socialistoj nun okupas 25, do gajno da 7 mandatoj.

La 17. kaj 18. aprilon okazis la novelektoj en la kantonoj Zuerich kaj Baselurbo. La zuerichaj kamaradoj sukcesis brilege. La ĝisnuna parlamento nombris 257 deputitojn el kiuj la socialistoj okupis 75 (29 1/4 %), la komunistoj 10 (4 %), do kune 85 aŭ la triononon; la nova parlamento nombras nur 220 deput., do 37 malpli. Malgraŭ tio la socialistoj ne nur ne perdis la proporcian nombron (12) al la malpliigo de la deputitaro, sed ili ankoraŭ gajnis 9 mandatojn. La nuna parlamento konsistas do el 84 soc. (38 1/4 %), 4 komunistoj (1 3/4 %) kaj 132 burĝoj (60 %). Ankoraŭ tia venko kaj tuta granda industri-kantono estos en la manoj de la laboristaro.

Aliel prezentiĝas la rezultato en Basel. Tie okazis ŝanĝoj nur interne de la du blokoj. La burĝa bloko moviĝas pli dekstren, la laborista bloko pli maldekstren. La socialistoj perdas 6 mandatojn je la profito de la komunistoj. En la antaŭa parlamento, konsistanta el 130 dep., la burĝa bloko nombris 68 dep., la maldekstra bloko nombris 61 dep. kaj inter la du blokoj estis unu patriota socialisto, kiu nun malaperis. La nova parlamento konsistos do el 69 burĝoj kaj 61 maldekstruloj. Bedaŭrinda fakto estas, ke en Basel la du laboristaj partioj akrege batalas unu kontraŭ la alian. Unuigita laboristaro certe sukcesus havigi al si belan plimulton. *(3477).*

## Internacia labortago?

Lastatempe la brita registaro kunvokis konferencon, por diskuti pri la ebleco krei interkonsenton rilate al reguligo de la labortago, laŭ la packontrakto de Versailles, Francio, Belgio, Italio kaj Britio sendis reprezentantojn.

La prezidanto de l' konferenco (Sir Arthur Steelmaitland) parolis pri la bedaŭregaj sekvoj, se l' nacioj konkurencus inter si je laborhoroj.

En Anglio la fabrikposedantoj kutime fipropagandas, ke l' germana metiisto laboras pli da horoj ol l' angla, dirante, ke tiu-ĉi laboras dek ĝis dekdu horojn potage. Ĉi-statistiko de D-ro Braun (germana reprezentanto) refutas tiun-ĉi pretendon: Statistiko por jan. 1925, entenanta 11 900 000 laboristojn en Germanio: Laboras malpli ol ok horojn 1 200 000; ok horojn laboras 8 000 000 kaj pli ol ok horojn laboras 1 900 000. *Jack Cooper (5575)*

## El estona karcero

Ĉi tie ni estas multaj laboristoj en karceroj. En la lastaj du jaroj eniris multaj centoj, kiuj restis de kruela murdado, kiun okazigis nia "pugno-demokratio".

En la oficejo de la t. n. "defendpolico" oni batis kruele ĉiun opan k-don por igi lin konfesi lian kulpon, ĉar al la "defendpolicanoj" mankis faktoj por akuzo.

Ĉiuj tiam enirintoj havis kiel memoraĵon de defendpolico blu-nigrajn makulojn sur la korpo kaj vizaĝo, kaj tie ĉi daŭriĝas la samo. La politikaj enkarcerigitoj ne sukcesis ankoraŭ forgesi, ke ili estas homoj, kaj postulas ankaŭ konvenan al homo kondutọn de la estraro — do ĉi-lastaj "kuracas" nin per malluma kaj malvarma punkarcero, kiu kaŭzas al la enkarcerigitoj ftizon kaj reŭmatismon. Dum la enkarcerigo multaj niaj k-doj estas kruele batataj. Plendo ne helpas, ĉar neniajn rezultojn ankoraŭ havis niaj plendoj, sed pro la plendo sekvos nova refoja "puno".

Kvankam "leĝoj" de rusa caro, kiujn aplikas la "demokratia juĝistaro" de Estonio, malpermesas la batadon kaj torturon de malliberigitoj, tamen ŝajnas, ke ni estas ekstere de la leĝoj. Sed por administrado de malliberejo oni ne havas leĝe firmitan ordon. En ĉiu malliberejo interna "ordo" dependas de bona aŭ malbona volo de la estro de koncerna malliberejo. Ili regas kvazaŭ aŭtonomiaj reĝoj en ĉi tiu miniatura "respubliko".

Inter la politikaj malliberuloj plejparte estas simplaj laboristoj, kies kulpo laŭ la demokratiaj perfortantoj estas nur, ke ili partoprenis unuiĝojn laboristajn, ĉiujn la administraro kaj la juĝantoj akuzos pro komunismo, kvankam laboristaj organizaĵoj, kiujn la akuzatoj partoprenis, estis leĝe registritaj de sama ministro por internaj aferoj, kiu nun nin ĉiujn perfortas, turmentas kaj murdas per siaj ordonatoj.

Inter la politikaj k-doj estas multaj espistoj, sed estas malpermesite ricevadi espaĵojn, ĉar, kiel diris prokuroro de juĝaj regantoj, ĉar ĉiuj esp-aĵoj enhavas komunisman fantomon. Ni nenion scias pri lab. nek pri esp. movado, sed nur esperas, ke venku nia afero.

Estas vintro, ofte la malvarmo superas 20°, sed ni estas preskaŭ nudpiedaj. — Ne kalkulindaj estas ja la ŝuaĉoj diable malnovaj kaj senplandaj. En ĉiuj ĉambroj estas supernorma nombro da malliberuloj, sed la fenestroj estas ŝraube fermitaj "por ke ne enblovu la malvarmo". Dum la vintra, frosta sezono, oni hejtas la fornon nur po unu kaj dufoje en la semajno. — Dum nehejtitaj tagoj varmigu la tro loĝatan ĉambron la malliberuloj mem, per sia "propra vaporo" estigata per 600 gramoj (tio estas nur oficiala normo) da pano kaj per diable aĉa supo el unikaj fiŝoj de "Peipsi-lago", kiu malbonodoras centkadavre. Preskaŭ ĉiuj k-doj (krom kelkaj esceptoj) estas juĝitaj al multjara punlaboro, sed niaj laboristaj parlamentanoj kaj ĉiuj antaŭenemaj unuiĝanoj al senlimtempa punlaboro. Unu el la parlamentanoj, la militjuĝantoj pro ridindaj akuzoj murdigis — pro kulpo, kio "bon" okaze valorus 3 monatojn da aresto en landoj kun leĝoj kaj ordo. Sed nialandaj murdistoj ne hontas ankaŭ nomi sin kulturhomoj kaj kulturregnanoj — jen malbelegaj grimacoj de la burĝa civilizacio.

Malgraŭ murdoj kaj torturoj, punkarceroj kaj batado — kiujn nialandaj diktatoroj aplikas al laboristoj, ili ŝajne jam tremas antaŭ liberaŭroro venonta. La tempon neniu ekhaltas kaj eĉ ni premigitoj havas belan esperon de l' libero.

*En Revala Centra Malliberejo*

## Education for Emancipation

(Edukado por Emancipado)

Estas la titolo de nova angle verkita libreto pritraktante la laboron de la NCLC. (Nacia Konsilantaro de Laboristaj Kolegioj). La NCLC. entreprenas ĉiun specon de laborista edukado. Ĝia agado etendiĝas tra Anglujo, Kimrujo kaj Skotlando, kaj ankaŭ ĝi faras gravan edukan laboron en Irlando, precipe ĉirkaŭ Belfast.

Laŭ la libreto, la nombro da Sindikatoj, uzantaj ĉiujn specojn de NCLC. Edukaj planoj estis en 1923, naŭ. En 1925 la nombro da sindikatoj altiĝis ĝis 28, reprezentante entute membraron de 1 750 000. Dum 1925 okazis rimarkinda kreskaĵo en la korespondanta fako de NCLC., kiu ne nur kreskigis la nombron da temoj instruataj pere de la poŝto (interalie Esperanto), sed ankaŭ duobligis la nombron da studentoj 1156. Dum la sama jaro 1,048 kursoj kun 25,071 studentoj estis starigitaj de NCLC. Entute proksimume 60,000 studentoj partoprenis dum 12 monatoj en la eduka laboro de NCLG. *C. S.*

## Sindikata progreso en Hindio

Oni povas gajni ideon pri la progreso farita dum la lastaj dekdu monatoj de la tuthinda sindikata kongreso, el la ciferoj montrantaj la aliĝintajn sindikatojn.

Ĉe Bombay en 1925 estis 37 sindikatoj aliĝintaj al la kongreso, reprezentantaj proksimume 100 000 membrojn. Ĉe Madras en tiu-ĉi jaro 57 sindikatoj estis aliĝintaj, reprezentantaj membraron de 125 000. La ĉeestado ĉe Bombay malgraŭ la fakto, ke Bombay estas pli granda industria centro ol Madras.

La teksaĵa laborista sindikato de Bombay estis starigita en januaro. Ĝi konsistis ĉefe el 9 mallarĝaj lokaj societoj, el kiuj 5 estis starigitaj dum la teksaĵa striko ĉe Bombay en lasta aŭtuno. La sindikato nun konsistas el pli ol 6000 membroj, kaj la monprovizo estas ducent funtoj sterlingaj. Tio estas, por hinda sindikato granda sumo, konsiderante, ke la teksaĵa laboristo ricevas tre malaltan salajron. Krom la ĉefoficejo en Sandhurst Road, la sindikato posedas du lokajn oficejojn en la Matanpura kaj Kurla distriktoj de Bombay. La ĝenerala sekretario estas s-ro R. R. Bakhale, la helpanta sekretario de la tut-hinda sindikata kongreso.

## La laborista movado en Sud-Manĉurio

Same kiel en Sud-Ĉinio, ĝis nun en Sud-Manĉurio neniam okazis labor-batalado kaj ĉiuj kapitalistoj pensadis, ke nur tie ĉi estas absoluta sendanĝera zono. Eĉ lastjare nur dufoje okazis aferetaĵo ĉe japana fabrikejo en Fung-Tjen, kvankam de post Ĉang-Kuo milito (internmalpaco en Ĉinio), pro kiu subite malkariĝis valoro de Fung-Tjen papermonoj (nekonvertebla papermono trouzadas sub regado de Estro-Ĉang), la laboristoj sentis timon de vivo.

Inter la metiistoj aŭ la Ku-Li (ordinaraj laboristoj), kiuj estis akceptantaj pagon de sia salajro per Fung-Tjen papermonoj, sentebliĝas granda maltrankvileco pro plikariĝo de vivo, de komercaĵ-prezoj, pro malkariĝo de Fung-Tjen-papermono kaj ili unuiĝintaj postulis plialtajn salajrojn.

Fine, la 1. febr. 600 karbministoj, kiuj laboradas ĉe Pen-ĉi-Hu fabrikfera Ko. (japan-kapitalista administro) decideme plenumis strikon, kiu flagradis de loko al loko, plue de laborejo al laborejo kaj la striko tute disvastiĝis en ĉiuj fabrikejoj. Preskaŭ ĉiuj kapitalistoj estas eksterlandanoj, kiuj sin trovas en Sud-Manĉurio. Strikantoj estas nun 18 000 anoj.

Tamen, iliaj proponoj pli progresas ol ĝisnuna prezentaĵo, t. e.

1. Ili strikis subite ne prezentante siajn proponajn kondiĉojn.
2. La proponajn kondiĉojn ili sentis per poŝto.
3. La reprezentantoj kaŝiĝis tre lerte.
4. La insisto ilia estas tre fortika.
5. Ili proponas ne sole altajn salajrojn, sed ili estas administrontaj fabrikejojn per si mem, forpelinte eksterland-kapitalistojn.

Kaj de nun la laborista movado en Sud-Manĉurio fariĝos pli kaj pli revoluciema. *Ĝunĵi Pakahaŝi.*

## Kie estas la tombo de mia filo

IRH. — La gazeto "Narod" publikigas leteron, en kiu patro skribas, ke sia filo kun 12 aliaj laboristoj estis arestitaj je la 29. Majo 1925 kaj ĝis nun neniaj postsignoj de ili estis trovitaj. Li petas la sciigon, kie troviĝas la tombo de sia filo! Ĉi tiu rimarkinda sciigo jam rilatas al okazoj, apartenantaj tutplene al la "feliĉa pac-epoko" de la amnesti-mensogisto Liaptscheff. La bulgara patro, kies filo estis forigita, tre bone scias, ke sub estreco de Liaptscheff en la malliberejoj same estas mortigita, kiel okazis sub Cankoff. Sole la elpendigita ŝildo estas pentrita per pli belaj frazoj. Trad. *4230.*

## Alvoko!

Pentekoston, la 23.—24. Majo okazos renkonto de la "Freien Jugend" (libera junularo) junaj anarkistoj sur la Leuchtenburg (lumkastelo) apud Kahla, Turingio. Anoncojn sendu al redakcio de la "Freien Jugend", Berlin C 2, Parochialstrasse 29.

Junaj anarkistoj alvenu multnombre al Leuchtenburg apud Kahla. *SAT-ano 2002.*

## La burĝa lerneja zorgado kaj edukado en Bulgario

Per tiu ĉi artikolo mi volas informi la tutmondan laboristaron, ne nur laboristaron, sed ankaŭ tiujn homojn, kiuj pretendas kaj prezidas la burĝan kulturon. Mi ankaŭ volas doni klaran bildon pri la zorgado kaj edukado en Bulgario, precipe pri vilaĝaj infanoj. Ja, la laboristaro tutmonda devas scii, ke en kamparana Bulgario — tritrionoj de la bulgara popolo estas kamparanoj.

En tiu ĉi artikolo mi volas montri, kiamaniere la bulgaraj instruistoj klarigas diversajn demandojn, kaj kiuj eniras la edukprogramon de la lernejoj. Nome la demandoj: pri higieno, pri la alkohola demando, tiu demando momente okupas preskaŭ ĉiujn saĝulojn. Niaj bulgaraj instruistoj, precipe vilaĝaj ne estas sur siaj postenoj. Kiel homoj, kiuj pretendas, ke ili estu gvidantaj edukistoj de bulgara popolo, forlasas la vilaĝon kaj iras urben, kie vivas siaj amikoj, atendas la finon de la monato por enpoŝigi la salajron. La popolo ja pagos! Pri la lecionoj la instruisto tute ne interesiĝas, ĉu la infanoj scias siajn taskojn aŭ ne. — La instruisto diras: tio ne estas mia afero, mia afero estas nur diri al la infanoj, ke ili legu la lecionon sur la paĝoj — tiu estas via leciono ktp. — por ekzameni ilin mi ne havas tempon, ĉar mankus al mi la libera tempo por promeni. Mi devas konstati, ke la nuna burĝa registaro maldungis preskaŭ ĉiujn maljunajn kaj pli seriozajn instruistojn sub diversaj pretekstoj.

La nuna burĝa registaro dungis junajn instruistojn, kiuj ne kapablas klarigi al la infanoj la plej simplajn demandojn. Ne nur tion! Unu instruisto de urbo Plovdiv estas eĉ sendita en vilaĝon por ekzameni la infanojn. Kiam li komencis ekzameni la infanojn, li povis konstati, ke la infanoj ne povas ricevi la ekzamen-dokumentojn, ĉar preskaŭ ĉiuj ne sciis siajn lecionojn.

Tia estas la edukprogreso en Bulgario — en tempo, kiam regas "saĝuloj-profesoroj".

Mi prenis kelkajn faktojn el bulgara gazeto, kiu klare montras la teruran fakton de infanedukado kaj zorgado speciale pri vilaĝaj infanoj. Laŭ gazeto "Zdravee" numero 14 de 1. aprilo. En 8 klasoj de vilaĝa lernejo oni faris enketon. "De 285 infanoj estas eĉ ne unu infano, kiu ne trinkas alkoholon! Ĉiu trinkas. De 276 (64 %) infanoj trinkas kune kun siaj familioj. Dum la tag- kaj vespermanĝo ili trinkas vinon kaj brandon. Nur 6 % konsumas malmulte da alkoholo. Ofte okazas, ke infanoj eniras ebriaj la lernejon.

De 285 infanoj (54 %) ili matenmanĝas nur sekan panon, aŭ panon kun ajlo. 31 % matenmanĝas vinan kaĉon, 10 % ne matenmanĝas kaj 5 % matenmanĝas lakton kaj formaĝon.

Ne ĉio! jen ankoraŭ alia enketo: de 138 vilaĝinfanoj 42 matenmanĝas; inter ili ne unu trinkas lakton. 12 lavas sin per sapo, 53 infanoj, kiuj sin banas unufoje pomonate, 20 infanoj ne estas banataj depost 4 monatoj, 15 infanoj lavas siajn piedojn ĉiusemajne, 5 lernas siajn lecionojn ĉe gaslampo, 107 skribas sur la fenestrobenkoj aŭ kuŝante surtere. Ĉiuj preparas siajn lecionojn en komuna ĉambro kune kun la tuta familio. En la sama vilaĝo estas ĉirkaŭ 24 trinkejoj.

Dum monato februaro sciencisto faris enketon ĉe la lernantoj de unu vilaĝo.

En I. fako li trovis inter 28 infanoj nur 6 sen pedikoj; en Ib. fako 27 infanoj nur 4 sen pedikoj; IIa. fako 24 infanoj nur 3 sen pedikoj; IIb. fako 23 infanoj nur 6 sen pedikoj; IIIa. fako 28 infanoj nur 8 sen pedikoj; IIIb. fako 30 infanoj nur 6 sen pedikoj; IVa. fako 30 infanoj nur 6 sen pedikoj; IVb. fako 25 infanoj nur 4 sen pedikoj.

Jen, la situacio en du aliaj vilaĝoj.

Nombro da lernantoj 298. Inter ili 222 kun ungoj, kun ne tonditaj haroj 23; kun ne purigitaj manoj 238; kun ne lavitaj piedoj 231; kun ne purigitaj oreloj 229; 6 infanoj havas orelmalsanojn; 4 kun defektita aŭdsento (surdaj); kun pedikoj 180; matenmanĝas nur panon 186; kun supo 4; kun teo 21; kun lakto 2. Nuntempe en Bulgario estas pli ol 100 000 malsanuloj de terura malsano — tuberkulozo.

65 % de vilaĝanoj ne povas legi kaj skribi.

Karaj legantoj, per tiu ĉi artikolo mi opinias doni al vi klaran bildon pri edukado en Bulgario. Publike oni diras, ke ĉiuj homoj devas esti singardaj kontraŭ tiuj malsanoj, kies kaŭzoj estas grandaj malhelpaĵoj. Se la vilaĝanoj intencas fari ion pri la bona edukado de siaj infanoj, tiam la burĝaro diras: haltu! ne rapidu, vi mem ne estas kapabla fari tion. Vi donu la monon al ni, ni povas ĉion fari, kio estas bezona por vi. Oni enpoŝigas la monon kaj la burĝa registaro faras nenion. Ofte okazas, ke nia registaro fermas la lernejon en la vilaĝo. Kiam la vilaĝanoj demandas la ĉefulojn, kial oni fermis la lernejojn? tiam oni respondas: ni fermis la lernejojn, ĉar vi ne sufiĉe zorgas por la infanoj. Tiamaniere la infanoj restas blinduloj nek povante legi nek skribi.

La vilaĝaj instruistoj nur interesas sin pri grandaj festoj kaj direktas sin al urbo al siaj konatuloj kaj amatinoj! Piaj estas la nunaj bulgaraj instruistoj! *Zdravejkin.*

## Li estis "forrabita" à la Mateotti . . .

IRH. El la tuta Bulgario venas protestoj al Sofio en kiuj anoj de la kamparana ligo indignas pro la malaperigo de la iama kamparana ministro Tomoff kaj grupo de kamparanaj delegitoj kaj funkciuloj (pere de 15 armitaj faŝistoj *kaj policanoj*). La registara gazetaro diskonigas pri tio, ke tio ne estas tiom grava por akcenti ĝin, ĉar similaĵoj ankaŭ okazis dum la regado de la kamparanoj (!) . . . La kamparana frakcio en la Sobranje (parlamentejo) transdonis interpelacion, en kiu ĝi demandas la ministron por internaj aferoj, ĉu li scias ion pri la sorto de Pekareff, membro de kamparana konsilantaro, kiu estis forrabita antaŭ nelonge de personoj nekonataj.

Kiel oni povas vidi: Trankvilo kaj ordo regas en Bulgario! Trad. *4230.*

## Kial Farinacci devis malaperi

IRH. Sur la kulminacia punkto de sia potenco, efektiviginte la absolvon de la Mateotti-murdistoj, Farinacci devis abdiki kiel general-sekretario de la faŝista partio. Ĉi tiu nekomprenebla agado kaŭzis ĉie malkontenton. Nun la iama soc.-dem. deputito Franceso Ciccotti publikigas detalojn pri la kaŝitaj kaŭzoj de la abdikigo de Farinacci. Laŭ ĉi tiuj sciigoj Farinacci opiniis, ke li ankaŭ povu trudi al Mussolini sian volon, ĉar li posedis dokumentojn, kiuj pruvas la rektan respondecon de Mussolini por la mortigo de Mateotti, same ankaŭ por aliaj krimoj. Farinacci kredis, uzi ĉi tiun materialon por elpremoj de Musolini, sed la samaj dokumentoj troviĝis ankaŭ en la manoj de la ministro por internaj aferoj, Federzoni. Federzoni krom tio ankoraŭ havas materialon, el kiu evidentiĝas, ke Farinacci estas subaĉetita per ½ miliono da liroj pere de la gvidantoj de la Banca Disconto kaj de la firmao Ansaldo. Ĉe ĉi tiu fiago partoprenis ĉiuj tri. Per ĉi-maniero ĉiuj faŝistaj gvidantoj klopodas riĉiĝi. Ĉar Farinacci provis, forpeli Federzoni-n el la ministerio por internaj aferoj kaj mem anstataŭi lin, tiu atakis lin kaj uzis la saman materialon por elpremoj kontraŭ Mussolini, kiu ankaŭ, kiel jam dirite, posedas Farinacci-n. Mussolini nun preferis oferi Farinacci-n anstataŭ ŝirmi Federzoni.

Ĉi tiuj valoraj por ni "internaj sciigoj" estis malkovritaj antaŭ nelonge per flugfolioj. Ili kvankam de la polico konfiskataj tamen atingis publikigon pri la fiagoj de la potenculoj en la registaro itala. Venos la tago de la "rekompenco"! *4230*

## La frank-falsigisto Nadossy kaŝis la murdistojn de Erzberger

IRH. — Pere de juĝo kontraŭ la "Esti Kurier" estas nun senerare pruvita, ke la policestro Nadossy tiamatempe malakceptis ĉiujn denuncojn pri la restadejo de la Erzberger-murdistoj. La supre citita gazeto aperigis artikolon en aŭgusto 1924, kiu pruvis, ke la murdistoj Heinrich Schulz kaj Heinrich Tillesen estis gastigitaj en la vilao de la deputito Gömbös. La juĝejo vidis en tiu agmaniero de la policestro malatentemon de la polico kaj kondamnis pro tio la redaktoron nur al monpuno de 1 ½ milionoj da kr., samtempe nuligante la verdikton al karcera puno. —

Refoje estas konstatita eĉ pere de Horthy-Hungario, ke intimaj interrilatoj ekzistas inter la murdistaj bandoj germanaj kaj la kontraŭ-revoluciuloj hungaraj. Sed ankaŭ hodiaŭ ili tre vigle interrilatas. *Trad. 4230*

# LABORISTA RADIO-INTERNACIO

Suplementa paĝo de Sennaciulo — Aperas dufoje monate

## Radiotelegrafa lingvo

### Kio ĝi estas?

Nuntempe pli kaj pli disvastiĝas konstruado de Radio-amatoraj sendstacioj, per kiuj oni serĉas ligojn kun diverslandaj Radio-amatoroj. Ordinare oni interligiĝas per Radio-telegrafaj signoj, ĉar teknike ili estas pli facile atingeblaj ol la Radio-telefonaj, kaj aliflanke ili havas distance pli grandan trafpovon.

Por multaj estas konata Morso-alfabeto, uzata por Radio-telegrafado. Ĝi estas kombinata el certa kaj difinita por ĉiu litero kvanto kaj sinsekvo de punktoj kaj strekoj kaj estas aplikebla por ajna lingvo.

Sed por rapidigi la telegrafadon oni aplikas ankaŭ specon de kondiĉa lingvaĵo, en kiu certa kombinaĵo de literoj anstataŭas certajn frazojn, ordinare ofte uzatajn ĉe Radio-telegrafado. Tiu kondiĉa lingvaĵo estas nomata — "Radio-kodo". Kiel ekz. de tiu lingvaĵo oni povas citi jenajn mallongigojn:

PRB — Ĉu vi deziras interparoli kun mi per internacia kodo?

QRZ — Ĉu miaj signaloj estas malfortaj?

QSO — Ĉu vi havas ligon kun . . .

Sed tiu ĉi kodo ne ampleksas ĉiujn bezonojn en Radio-interligo; krome, estante akceptita ĉe internacia Radio-kongreso de jaro 1913, ĝi jam malnoviĝis. Tial krom tiu ĉi kodo, Radiistoj uzas ankoraŭ specialan Radio-lingvaĵon, en kiu apartaj vortoj ankaŭ estas anstataŭataj per kelkaj literoj; tiu lingvaĵo estas konata sub la nomo "Radio-ĵargono". Ĝi ne jam estas oficiale rekonita, kiel internacia, sed sufiĉe vaste disvastiĝis inter radiistoj.

Necesas noti, ke tiu ĉi Radio-ĵargono prezentas el ni plejparte mallongigojn de anglaj vortoj, kio estas komprenebla, ĉar inter angloj kaj amerikanoj estas plejmulto da Radiistoj, kiuj enkondukis en praktikon la ĵargonon, bazitan sur angla lingvo.

### Kampo por apliko de Esperanto

Sed tiu anglalingva karaktero de la ĵargono limigas ĝian disvastiĝon kaj praktikadon. Kiel ĉie, ankaŭ en ĉi-sfero la baroj de diverslingveco memorigas pri si. Ĝuste tial Radio-fakoj de sovetiaj sindik. centroj (VCSPS kaj MGSPS) kaj la plej disvastigita en Sovetio Radio-revuo "Radio-Amatoro" ĵus elpaŝis kun la propono kaj preta projekto kontraŭ ĉi-ĵargono sur bazo de lingvo internacia, kaj nome de Esperanto. Ili alvokas al sovetiaj Radio-amatoroj vaste praktiki ĉi-ĵargonon por ke ĝi forigu el la uzado la ĵargonon anglalingvan.

Ĉu necesas diri, ke tiu iniciato de sovetiaj sindikatoj estas nova paŝo sur la vojo al internaciigo de Radio-afero kaj sur la vojo al definitiva uzado de Esp-o, kiel lingvo internacia! Tial ne nur sovetiaj k-doj, sed ĉiulandaj laboristaj Radio-amatoroj, ĉiulandaj esperantistaj Radio-amatoroj devus ĉiamaniere disvastigi la esperantlingvan ĵargonon. Kiamaniere? Nu, tio estas simpla: ĉi sube ni presas la plenan ĵargonon kun esperantlingvaj klarigoj de ĉiuj mallongigoj. Radio-amatoroj komencu ĝin tuj vaste apliki kaj krome, tradukinte la klarigojn de la mallongigoj en sian nacian lingvon, klopodu enpresi la ĵargonon en siaj nacilingvaj Radio-revuoj.

Per tio venkas internaciismo kaj Esp-o. Do, al la laboro!

## Esperanto kaj Radio

Esperanto progresas senhalte en Radio-sfero. Preskaŭ ĉiuj gravaj Radio-stacioj en Eŭropo, kaj pluraj en Ameriko, en Azio kaj Aŭstralio donas kursojn de Esperanto aŭ faras disaŭdigojn en tiu lingvo. Kelkaj el ili havas semajnajn programojn plene en Esperanto por la alilandaj aŭskultantoj.

La statistiko montras, ke de 1. jan. ĝis 1. aprilo 1925 okazis per Radio 118 paroladoj (68 pri Esp-o kaj 50 en Esp-o), kaj 20 kursoj de 50 stacioj en 19 landoj de 3 kontinentoj. Intertempe tiu ĉi nombro ankoraŭ pligrandiĝis senteble. La stacio de Tokio nun partoprenas al la disvastigo de Esperanto per Radio.

| Mallongigoj | | Signifo | Mallongigoj | | Signifo | Mallongigoj | | Signifo |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| antaŭaj | novaj | | antaŭaj | novaj | | antaŭaj | novaj | |
| abt | pr | proksimume | gg | — | komenco de labo- | ru | — | ĉu vi? |
| accw | raks | sendilo, funkcianta | | | ro, funkciado | sa | prl | mi parolas |
| | | per rektifita alterna | gld | gho | mi ĝojas | sigs | sig | signaloj |
| | | kurento | ham | sam | amatoro, posed- | gv | dn | doni |
| aftrn | pt | posttagmeze | | | anta sendilon | spk | prli | paroli |
| ammtr | amtr | ampermetro | hi | alt | alta | test | exp | eksperimento, |
| bfre | an | antaŭ | hr | — | tie ĉi | | | -a laboro |
| *aŭ* b4 | | | hrd | aud | mi aŭdis | tng | obj | objekto |
| bjr (fr.) | | | ht | — | alta tensio | thr | tie | tie |
| gr (germ.) | bt | bonan tagon | hv | hv | mi havas | tht | la | tio ĉi |
| gd (angl.) | | | hw | kl | kiel | tks | dnk | mi dankas |
| bn | bn | bonan nokton | inpt | pren | primaria potenco | tll | gh | ĝis |
| gn | | | | | de sendilo | tmr | mg | morgaŭ |
| bsr | | | ky | mp | Morso-klavo | trub | mh | malhelpo |
| ga | bv | bonan vesperon | ltr | ltr | letero | u | vi | vi |
| ge | | | low | malt | malalta | unles | — | se ne |
| btr | pb | pli bone | | mgr | malgranda | ur | via | via |
| cb | ru | respondu | m | m | metro, minuto | vltmtr | vltm | voltmetro |
| cld | vk | vokis, vokas | mght | — | povas | vy | tre | tre |
| clg | | | mike | mik | mikrofono | vt | vt | valvo |
| cp | kp | kontraŭpezo | msr | — | sinjoro | wl | miv | mi deziras, volas |
| crd | pk | poŝtkarto | om | — | amiko | wrk | lbr | labori |
| cu | m vk | mi vokas vin | — | klg | kolego | wrls | rdo | radio |
| cuagu | m rvk | mi ree vokas vin | msg | inf | informo | wrls | rde | perradie |
| cul | ad | ĝis revido, adiaŭ | mny | mlt | multe | wld | ol | ondlongo |
| cw | ko | kontinua | nil | ne | nenio | x | pt | permeso por send- |
| dccw | kks | sendilo, funkcianta | nite | nt | nokto | | | ilo |
| | | per kontinua ku- | nd | nf | nenio farebla | yes | jes | jes |
| | | rento | nm | np | nenio plu | — | espo | Esperanto |
| de | de | de, el | nw | nun | nun | 2nte | hn | hodiaŭ nokte |
| dif | dif | diferenco | ok | r | ĉio ricevita | 73 s | rs | bondeziron, radio- |
| dx | ldi | granda (longa) | ors | ss | sparka sendilo | | | saluton! |
| | | distanco | pse | bvu | bonvolu | *Signado de tempo* | | |
| ere | — | tie ĉi | pt | pt | punkto | gmt (a) | — | Okcident-eŭropa |
| fb | — | mi deziras sukce- | rd ok | r | ĉio ricevita | | | tempo |
| | | san laboron | rdn | rdd | radiado | mez (germ.) | met | Mez-eŭropa tempo |
| fone | fon | telefono | rdo | rdo | radio | oez | oet | Orient-eŭropa |
| frg | frk | frekvenco | rpt | rpt | ripetu ripetas | | | tempo |

## Kiel laboras ruĝa soveta prokuroro

En malnova Rusio forestis la vorto, kiu estus pli abomeninda, ol prokuroro. Ŝajnis, ke en ĉi-oficejo koncentriĝis ĉio, kion plej multe oni malbenis en malnova reĝimo. La prokuroroj estis veraj ekzekutistoj de laboristoj kaj kamparanoj, kiam la lastaj almenaŭ iomete penis plibonigi sian maldolĉan sorton.

Sed ne la sama situacio estas nun en soveta Rusio. Ni ankaŭ havas prokurorojn, sed tiaj jam tre multe diferenciĝas de malnovaj caraj prokuroroj. Ili ankaŭ estas gardistoj de leĝo, leĝeco, sed ĝi estas jam alia, revoluciema leĝeco, celanta subtenon kaj plifirmiĝon de ordo, kiun kreis oktobra revolucio.

Ĝis 1921, kiam soveta Rusio estis kvazaŭ en sieĝo, ĉirkaŭigita per ringo de malamikemaj bordoj, ni preskaŭ nenion pensis pri revolucia leĝeco kaj pri rigora plenumo de leĝoj. Oni kreigis tiam leĝecon sur batalkampoj, ĝin almilitadis kaj por ĝi mortadis kaj mortigadis — kun armilo en manoj.

Sed la milito finiĝis, ĉe ni ekaperis niaj leĝkodoj kaj al ĉiuj, ekzistantaj antaŭe oficejoj, aldoniĝis nova-soveta prokuroro.

Ruĝa prokuroro estas defendanto de laborist-kamparanoj. Oni povas tion vidi eĉ laŭ ilia socia stato — preskaŭ ĉiuj, almenaŭ plejparte, niaj prokuroroj eliris el mezo de laboruloj, malplejparte — el oficistoj. Grandparte ili estas membroj de tutsoveta komunista partio.

Per du rimedoj laboras nia prokururo, ekstermante la krimecon el nia vivo. Tie, kie oni ne plenumas la leĝon laŭ malklereco — prokuroro pliklerigas jure malluman loĝantaron, aranĝante lekciojn, jurkonsulejojn ĉe sovetaj institucioj, kluboj, legejoj; tie oni donas al kamparano ne nur senpagan konsilon, sed ankaŭ al li skribos necesan petskribaĵon.

Niaj leĝoj estas malmultnombraj, simple kaj klare skribitaj kaj ĉiu legkapabla kamparano aŭ laboristo ilin tre bone komprenos. Inokuli en menson de ĉiu laborulo scion de siaj leĝoj, de siaj rajtoj kaj devoj — jen estas la plej grava tasko, kiun starigis al si kaj ĝin plenumas prokuroro, multe pri tio raportante dum laboristaj kunvenoj.

Aliparte — kie oni faras krimojn, bone sciante la leĝon, precipe, kiam tion faras niaj klasaj malamikoj, penantaj forigi laboristan potencon — tiam la labormetodo de prokuroro estas severa kaj tre klara. Tiam prokuroro agas per metodoj de subpremado, dume uzante la fortojn, kiujn ni heredis de burĝaro — juĝejoj, malliberejoj ktp.

La prokuroroj ne nur mem elpaŝas en juĝprocesoj, kiel ŝtataj akuzantoj — ili penas tiel fari, ke akuzado elirus de loka loĝantaro mem, ĉar nur ĝia reprezentanto kaj defendanto estas soveta registaro. En procesoj, kiuj havas socian intereson, tre ofte kiel akuzantoj en juĝejo elpaŝas ne prokuroroj, sed reprezentantoj de loka loĝantaro, t. n. "sociaj akuzantoj". Tiamaniere soveta registaro ne nur ekinteresigas la loĝantaron en rezulto de proceso, sed ankaŭ al si preparas estontajn, vere kamparanajn aŭ laboristajn prokurorojn.

Ni vidas el tio, ke ruĝa soveta prokuroro ne estas la sama, kiel prokuroro de malnova cara Rusio aŭ prokuroro de ĉiu nuntempa kapitalista regno. Li jam estas, kiel ni lin priskribis, unu ĉenero de la tuta revolucia laboro, li, renkonte al laboristoj kaj kamparanoj irante en iliaj multnombraj plendoj kaj petskriboj, alportas sian parton da laboro por konstruado de komunismo.

Originale de *P. Kirjuŝin* (ruĝa prokuroro).

## Trijara jubileo de smolenska laboristkorespondantaro

Antaŭnelonge smolenska (Sovet-Unio) gazeto "Laborista Vojo" festis trijaran jubileon de sia laboristkorespondantaro.

Niaj laboristkorespondantoj ne similas korespondantojn de l' burĝaj gazetoj. La niaj estas simplaj laboristoj, kiuj skribas por sia gazeto pri sia uzino, pri ĝia vivo kaj pri ĝiaj difektoj. Pri ili Lenin diris: "Donu pli larĝan eblecon al laboristoj skribi por siaj gazetoj, skribi pri ĉio, kio ilin interesas."

Kaj laboristoj komencis skribi, ĉiam pligrandigante sian korespondantan armeon. Jen ekzemplo: antaŭ tri jaroj en Smolensk estis nur ok korespondantoj kaj nun en urbo ekzistas 35 rondetoj kun 400 membroj-laboristkorespondantoj. Ili eldonas en urbo pli ol kvindek murgazetojn.

Pri kio skribas laboristoj? Rigardu: jen unu skribas pri malbona kooperativo, la alia — pri nebone laboranta profunuiĝa komitato, tria — pri io simila. Kaj iliaj skribaĵoj helpas: post presigo de unu artikoleto pliboniĝis doktora helpo al laboristoj, post la alia oni komencis ĝustatempe pagadi laborpagon, post la tria — oni tuj aĉetis por laboristoj specialan laborvestaĵon. Laboristkorespondantoj helpas al laboristoj, registaro kaj partio nuligi ĉiujn difektojn, kiu ankoraŭ kaŝiĝas en mallumigitaj anguletoj, lumigante ilin per siaj artikoloj kaj skribaĵoj.

Tial dum ilia jubileo ĉiuj salutis ilin.

— Vivu por ĉiam kara laboristkorespondantaro, bona helpanto por laborista partio, — diris unu maljuna laboristo.

Same salutis ilin per *esperanta* paroladо franca elmigrinto k-do P., scianta nur francan lingvon kaj Esperanton. Post lia saluto la solena kunsido decidis: sendi per lingvo Esperanto fratecan saluton al laboristaj eksterlandaj gazetoj, kun kiuj estas ligitaj smolenskaj esperantistoj, kaj pli larĝigi kaj profundigi interligon kun eksterlandaj kamaradoj. Dume niaj esperantistoj, gazetlaborantoj kaj laboristkorespondantoj estas ligitaj kun 23 kamaradoj el ok landoj. Por tago de estonta kvarjara jubileo ni havas celon: ĉiu smolenska laboristkorespondanto devas estis ligita kun iu kamarado eksterlanda. Por la lasta celo en Smolensk estas organizita loka oficejo de Internacia Laborista Esperanta Presservo.

*R. Nikolskij.*

## Deklaracio de aŭstra laborista delegitaro pri Sovetio

Sovetlandon vizitis aŭstraj laboristoj. 10. februaron ili forveturis el Moskvo por 6-semajna vojaĝo tra Sovetio. Antaŭ sia forveturo ili transdonis al la redakcio de "Izvestija" jenan deklaracion:

"Aŭstra laborista delegacio forveturas hodiaŭ el Moskvo, sin direktante trans Kievo kaj Ekaterinoslav — Gruzion. La delegacio utiligis sian ĉeeston en Moskvo ne nur por konatiĝi kun laboro en entreprenoj, sed ankaŭ por pli intime kontaktiĝi kun centraj organoj de la rusa frateca profesi-movado.

Impresoj, faritaj al ni per ĉio, kion ni ĝis nun vidis, tute dispelis kalumniajn elpensojn pri soveta Rusio, disvastigitajn en eksterlando.

Ni vidas landon, sin okupantan per socialista konstruado, landon, kie laboristaj masoj, intime kunfanditaj en komuna laboro, forĝas novajn formojn de socia strukturo.

Sciigojn kaj statistikan materialon, kun preteco metitajn en nian disponon de centraj institucioj, ni kontrolis tra entreprenoj kaj per interparoloj kun komunistaj kaj senpartiaj laboristoj, kaj ĉiuj-ĉi sciigoj montriĝis tute veraj.

Precizan kaj detalan raporton pri niaj observoj kaj impresoj en Sovet-Unio ni donos nur post nia reveno el la plua vojaĝo!!

Moskvo, 9. Febr. 1926.

Sekvas 14 subskriboj.

*V. L. 4696.*

## Esperanto kaj senalfabeteco

Rusio estas lando de kontrastoj (malaĵoj) antaŭ nelonge diris iu eminenta persono.

La plej perfekta sociordo — soveta reĝimo, kaj la plej malalta mastrumado de terkulturo.

En Sovetio disvastiĝas esp. — lasta vorto de komprenigilo tekniko, kaj en Sovetio ne tiel facile estas plenumi la deziron, likvidi senalfabetecon.

Sur paĝoj de "Uĉitelskaja Gazeto" — organo de C. K. Unio de klerigadlaborantoj USSR oni pridiskutas la demandon je enkonduko esp. en lernejojn (vidu n-ro 53, 73, 77) kaj sama gazeto en n-ro 79 komunikas pri unu loko, kiu estas mil verstojn (versto — preskaŭ 1 kilometro) de Irkutsk (Sibirio) kun 8000 enloĝantoj, inter kiuj estis nur unu, kiu povis iom legi kaj skribi kaj nun ĉi homo mortis; aliaj tute estas senalfabetuloj. Tamen malaĵoj estas pli esperplenaj ol nivelaĵoj ekz. Germanio, kie preskaŭ ĉiuj legas kaj skribas, bone komprenas esp., sed kie superregas politika analfabeteco.

*SAT-ano 3409.*

## La vagulo

Simpla, sensignifa vagulo. Laŭ profesio — tajloro. Harojn li havas blankaj kiel lakto. Li partoprenis la mondmiliton suferas pro reŭmatismo, edzinon entombigis antaŭ dekkvin jaroj. Multfoje punita, sen loĝejo, sen okupo, li vagas, petas almozon ofte eĉ donacitan panon li ne havas sufiĉe por satmanĝi. Estas malpermesite al li reveni la ĉefurbon, kaj la polico donas al li mizeran ateston.

La 18. februaro li estis surprizita de policisto, ĵus kiam li estis etendanta manon, por pli detale provrigardi la pomojn en korbo antaŭ negocista butiko. Du jam trovis azilon en lia poŝo, kaj la tria ĵus estis sekvonta la saman vojon. Maldikiĝinta malvarmiĝinta, malsata li estis. Li kontraŭstaris la policiston, kiu lin faligis teren, arestis kaj forkondukis.

La 2. aprilo li estis juĝata. Ŝtelo kaj kontraŭagado al policisto kaj reveno en ĉefurbon. Ne eĉ unu vorton li diris por defendi sin. Nek tion, li diris, ke tiam li ne havas eĉ peceton da pano en sendenta buŝo dum kelkaj tagoj, ke li malsatas kaj pro malsato li ŝtelis tiujn tri pomojn, la malsato, estis la kaŭzo, pro kiu li piedire remigris al la ĉefurbo, en la trompema espero, ke en granda urbo pli versimile oni kompatos lin kaj simpatios pro lia kompatinda kaj kaduka korpo. Oni ne kompatis, ne simpatiis.

Li ne malbenas. Inerta li estas al si eĉ al aliuloj. Nur la morton kompateman li atendas.

La vagulo, porcio de homviando, mizero kaj doloro kaj tamen antaŭ jaroj plene da suno kaj forto, la mastroj lin ŝatis pro lia lerteco. Kaj hodiaŭ? Korpo kaduka spirite inerta — plorinde. Du monatojn li ricevis — salajro por tutviva laboro...

El Rudé Práva (Ruĝa Rajto), Praha *6444.*

## Saluton al bulgarinoj!

Tiu-ĉi letero estas skribita de malbone alfabeta rusa kamparanino, kiu, ne povante mem pro diversaj kaŭzoj lerni esperanton, tamen sen iuj diskutoj, kredante utilecon kaj uzeblecon de la lingvo internacia, petis smolenskajn esperantistojn, ke ili per ia-ajn maniero igu ŝian leteron legebla por bulgarinoj.

Varmegan saluton al la laboristinoj kaj kamparaninoj bulgaraj. Mi, libera kaj plenrajta civitanino de Sovet-Unio, de Smolenska guberio (regiono), Gjatska uezdo (distrikto), salutas vin je nomo de virinoj de Miŝinskaja volostj' (rajono) kaj mi deziras al vi plenrajtiĝi same, kiel ni virinoj de Sovet-Unio. Konante bone la staton de bulgara virino, ĉar mi mem laŭ la naskiĝdeveno estas bulgarino, kaj komparante tiun-ĉi staton kun la stato de virino rusa, mi sentas min devigita kompati vin, karaj kamaradinoj—virinoj. Sed ni, virinoj de Sovet-Unio esperas, ke vi malproksiman estontan tempon estiĝos same plenrajtaj, kiel ni, ke vi havigos al vi la egalrajtecon, kiu apartenas al vi, sed nur dank' al "favoraj" regantoj vi ĝin ne ricevas, ĉar ĝi por ili ne estas profitdona. Nur la soveta registaro bone komprenis ĉi-tion kaj donis al ni kune kun viroj nian civitanan rajtaron. Kaj ni, virinoj rusaj, scipovos pruvi, ke ne senutile oni donis al ni la rajtojn.

Ankoraŭ foje mi salutas vin je nomo de ĉiuj virinoj de Miŝinskaja volostj' kaj mi deziras al vi plenan sukceson en liberiĝo de ekspluatantoj kaj unuigo de virinoj-laboristinoj kaj kamparanoj ĉirkaŭ la proletariaro por komuna batalo kontraŭ premegantoj, por plifirmigo de internacia laborista ligo diverslanda, por garantii sukceson de proletaria revolucio. Vivu libera kaj egalrajta virino! Vivu ŝia liberiginto! Vivu la mondrevolucio! *Marija Ivanova*

(Smolensk. gub., Gĵatskij uezdo, vilaĝo Aljenkino).

## Ĝustigo

En "Sennaciulo" n-o 26 (78) en la artikolo "Ligo de nacioj kaj pacemo" — k-do "SAT 3409" faris skriberaron, kiu povas okazigi gravan miskomprenon:

Li donis sumon de *ĝeneralaj elspezoj* de USSR. en la j. 1925 = 998972500 rbl. kaj sumon de *militelspezoj* dum la sama periodo = 407247000 rbl. kaj el tiuj du ciferoj li konkludis, ke *preskaŭ duono* de ĉiuj elspezoj en Sovetio estas uzataj por la armeo.

*Tio ne estas vera,* ĉar efektiva sumo de ĝeneralaj elspezoj estas ne 998972500 rbl., sed 1998972500 rbl.

Tio ŝanĝas la tutan bildon: *Malpli ol kvarono* (sed eĉ ne duono) de ĉiuj elspezoj en Sovetio estas uzataj por la armeoj.

Mi proponas al k-do, estonte pli ĝuste reskribadi la ciferojn, ĉar iufoje eĉ la "unuoj" multe signifas, precipe, se ĝi signifas unu miliardon. *3717.*

## La tervizito de Jesuo dum la Unua de Majo

*de Sao* (Fino)

Tiam ni eniris regionon, kiu montris gigantajn konstruaĵojn — fabrikojn kaj multajn ferstangajn turojn — minejojn. Kaj ĉi tie ni vidis grandegan amason da homoj en bluaj vestoj. Kalaj manoj tenis ne trikolorajn sed ruĝajn standardojn. Energie, senkompate aspektis la vizaĝoj. Tiu bildo rememorigis nin pri jam viditaj etaj grupoj samspecaj en aliaj regionoj. Jesuo tuj alpaŝis al unu el la homoj: "Amiko, diru al mi kiaj vi estas?" La homo turnis sin al ni: "Ni estas la proletaro" fiere sonis "kaj hodiaŭ ne nur ni, sed ĉiuj proletoj sur la terglobo festas la Unuan de Majo, ne eligante vivu-kriojn pri iu propra patrio aŭ iu aparta standardo. Ni havas nur unu patrion — la mondon kaj unu standardon — la ruĝan." "Kaj kion vi volas?" esploris Jesuo." Justecon, liberecon kaj ke ĉiu laboru! Ekĉesu estadi riĉeco apud mizero." La saman, kion ankaŭ mi volis en Palestino" murmuris Jesuo. "Ne plu ekzistu potencaj riĉuloj, kiuj elsuĉas la mizerularon", daŭrigis la blubluzulo. "Pro ili, kiuj ne seminte tamen konstante rikoltas, multaj devas suferi. Rigardu jen la nude-krudan domegon — malliberejo en kiun oni ŝovas la ribelantojn — justemulojn. Rigardu la bordelon, kunvenejo de hominoj malindigitaj de tiuj, kiuj indignas pri ili. Rigardu la minejojn, la fabrikojn — ni konstruis ĉion, ni proletoj kaj nia kompenso: malsato, sklaveco, mallibereco." "Ĝuste tiel, kiel en Jeruzalemo miatempe" konkludis Jesuo flustre. Laŭte li demandis: "Kaj kiel vi volas ŝanĝi tion? Ĉu vi obeas la biblion?" "Jen, la biblio kaj jen kiel ni volas ŝanĝi tion," la proleto respondis kaj doninte libreton montris al Jesuo certan linion. La difilo legis: "Ni deklaras malkaŝe, ke niaj celoj povas esti atingitaj nur per la perforta renverso . . ." "For la perforton!" Jesuo milde deklaris. "Beataj estas la pacemuloj, beataj estas la pardonemuloj. Amu viajn malamik — — —" "Malbenataj friponoj, malaperu, tuj tuj!" Policisto alkuregis batante ĉiun dorson atingeblan. "Pri ĉio venkas la Amo!" elvokis Jesuo kaj paŝis policiston: "amiko mia, eningigu cian glavon, ni estas fratoj do ni estu tiaj!" "Kion? Fratoj?" la policisto furioze kriis. Li levis la sabron kaj mi jam opiniis Jesuon batata kiam mi subite sentis en miaj manoj la ŝnuregon. Ankaŭ Jesuo jam kaptis ĝin kaj tuj ni leviĝis for de la tero . . .

En alto de 30—40 metroj ni, turninte niajn rigardojn teren observis ĉie, en ĉiu lando proletojn, kiel klarigis tiu, kiun Jesuo demandis. Ĉiuj tenis sangeruĝajn flagojn. Kaj la flagoj flirtis, flirtegis kaj super la terglobo ili kuniĝis formante gigantan flamegon. Eĉ nin atingis la ardaj langoj kaj el sub ili eksonis krio, potenca, venkscia: "Vivu la unua de Majo!" Ĵure aldoniĝis: "Ni kreos la eternan majon!" Tiam sekvis sono premata, kvazaŭ elinfera: "Liberecon, liberecon!" kaj minace, tondre "Li—ber—econ!" De malproksime kuraĝige venis responda voko: "Faru tiel, kiel ni" kaj mi kredas la voko estis el oriento. "Ili ne plu bezonas min" diris Jesuo malaperante.

Mi, ne plu kapabla teni min, refalis teren kaj — revekiĝis, trovante min sur mia seĝo, tenante la fadenon en mia mano . . .

Sed nun mi rapidis pretigi la flagon por ne malfruiĝi. Atinginte la straton mi rimarkis, ke mi sonĝe jam vidis tion, kio efektive okazas. Ĉie klopodis proletoj kun ruĝaj flagoj atingi la renkontejojn por partopreni la majan manifestadon. Tra la aero alondis al miaj oreloj proleta maj-kanto:

> Hodiaŭ laboras neniu —
> Ni homan indecon akiru,
> Kaj tiun-ĉi tagon por festo elektu
> Kaj pezajn katenojn disŝiru.

Tio multe kuraĝigis min, ĉar mi denove ekkonis, ke la proletaj aspiroj jam tute ne estas sonĝoj, sed ili enpaŝis en la seniluzian vojon kundukantan al realeco.

## Kiel laboras ruĝa soveta prokuroro

En malnova Rusio forestis la vorto, kiu estus pli abomeninda, ol prokuroro. Ŝajnis, ke en ĉi-oficejo koncentriĝis ĉio, kion plej multe oni malbenis en malnova reĝimo. La prokuroroj estis veraj ekzekutistoj de laboristoj kaj kamparanoj, kiam la lastaj almenaŭ iomete penis plibonigi sian maldolĉan sorton.

Sed ne la sama situacio estas nun en soveta Rusio. Ni ankaŭ havas prokurorojn, sed tiaj jam tre multe diferenciĝas de malnovaj caraj prokuroroj. Ili ankaŭ estas gardistoj de leĝo, leĝeco, sed ĝi estas jam alia, revoluciema leĝeco, celanta subtenon kaj plifirmiĝon de ordo, kiun kreis oktobra revolucio.

Ĝis 1921, kiam soveta Rusio estis kvazaŭ en sieĝo, ĉirkaŭigita per ringo de malamikemaj bordoj, ni preskaŭ nenion pensis pri revolucia leĝeco kaj pri rigora plenumo de leĝoj. Oni kreigis tiam leĝecon sur batalkampoj, ĝin almilitadis kaj por ĝi mortadis kaj mortigadis — kun armilo en manoj.

Sed la milito finiĝis, ĉe ni ekaperis niaj leĝkodoj kaj al ĉiuj, ekzistantaj antaŭe oficejoj, aldoniĝis nova-soveta prokuroro.

Ruĝa prokuroro estas defendanto de laborist-kamparanoj. Oni povas tion vidi eĉ laŭ ilia socia stato — preskaŭ ĉiuj, almenaŭ plejparte, niaj prokuroroj eliris el mezo de laboruloj, malplejparte — el oficistoj. Grandparte ili estas membroj de tutsoveta komunista partio.

Per du rimedoj laboras nia prokururo, ekstermante la krimecon el nia vivo. Tie, kie oni ne plenumas la leĝon laŭ malklereco — prokuroro pliklerigas ĵure malluman loĝantaron, aranĝante lekciojn, jurkonsulejojn ĉe sovetaj institucioj, kluboj, legejoj; tie oni donas al kamparano ne nur senpagan konsilon, sed ankaŭ al li skribos necesan petskribaĵon.

Niaj leĝoj estas malmultnombraj, simple kaj klare skribitaj kaj ĉiu legkapabla kamparano aŭ laboristo ilin tre bone komprenos. Inokuli en menson de ĉiu laborulo scion de siaj leĝoj, de siaj rajtoj kaj devoj — jen estas la plej grava tasko, kiun starigis al si kaj ĝin plenumas prokuroro, multe pri tio raportante dum laboristaj kunvenoj.

Aliparte — kie oni faras krimojn, bone sciante la leĝon, precipe, kiam tion faras niaj klasaj malamikoj, penantaj forigi laboristan potencon — tiam la labormetodo de prokuroro estas severa kaj tre klara. Tiam prokuroro agas per metodoj de subpremado, dume uzante la fortojn, kiujn ni heredis de burĝaro — juĝejoj, malliberejoj ktp.

La prokuroroj ne nur mem elpaŝas en juĝprocesoj, kiel ŝtataj akuzantoj — ili penas tiel fari, ke akuzado elirus de loka loĝantaro mem, ĉar nur ĝia reprezentanto kaj defendanto estas soveta registaro. En procesoj, kiuj havas socian intereson, tre ofte kiel akuzantoj en juĝejo elpaŝas ne prokuroroj, sed reprezentantoj de loka loĝantaro, t. n. "sociaj akuzantoj". Tiamaniere soveta registaro ne nur ekinteresigas la loĝantaron en rezulto de proceso, sed ankaŭ al si preparas estontajn, vere kamparanajn aŭ laboristajn prokurorojn.

Ni vidas el tio, ke ruĝa soveta prokuroro ne estas la sama, kiel prokuroro de malnova cara Rusio aŭ prokuroro de ĉiu nuntempa kapitalista regno. Li jam estas, kiel ni lin priskribis, unu ĉenero de la tuta revolucia laboro, li, renkonte al laboristoj kaj kamparanoj irante en iliaj multnombraj plendoj kaj petskriboj, alportas sian parton da laboro por konstruado de komunismo.

Originale de *P. Kirjuŝin* (ruĝa prokuroro).

## Trijara jubileo de smolenska laboristkorespondantaro

Antaŭnelonge smolenska (Sovet-Unio) gazeto "Laborista Vojo" festis trijaran jubileon de sia laboristkorespondantaro.

Niaj laboristkorespondantoj ne similas korespondantojn de l' burĝaj gazetoj. La niaj estas simplaj laboristoj, kiuj skribas por sia gazeto pri sia uzino, pri ĝia vivo kaj pri ĝiaj difektoj. Pri ili Lenin diris: "Donu pli larĝan eblecon al laboristoj skribi por siaj gazetoj, skribi pri ĉio, kio ilin interesas."

Kaj laboristoj komencis skribi, ĉiam pligrandigante sian korespondantan armeon. Jen ekzemplo: antaŭ tri jaroj en Smolensk estis nur ok korespondantoj kaj nun en urbo ekzistas 35 rondetoj kun 400 membroj-laboristkorespondantoj. Ili eldonas en urbo pli ol kvindek murgazetojn.

Pri kio skribas laboristoj? Rigardu: jen unu skribas pri malbona kooperativo, la alia — pri nebone laboranta profunuiĝa komitato, tria — pri io simila. Kaj iliaj skribaĵoj helpas: post presigo de unu artikoleto pliboniĝis doktora helpo al laboristoj, post la alia oni komencis ĝustatempe pagadi laborpagon, post la tria — oni tuj aĉetis por laboristoj specialan laborvestaĵon. Laboristkorespondantoj helpas al laboristoj, registaro kaj partio nuligi ĉiujn difektojn, kiu ankoraŭ kaŝiĝas en mallumigitaj anguletoj, lumigante ilin per siaj artikoloj kaj skribaĵoj.

Tial dum ilia jubileo ĉiuj salutis ilin.

— Vivu por ĉiam kara laboristkorespondantaro, bona helpanto por laborista partio, — diris unu maljuna laboristo.

Same salutis ilin per *esperanta* paroladо franca elmigrinto k-do P., scianta nur francan lingvon kaj Esperanton. Post lia saluto la solena kunsido decidis: sendi per lingvo Esperanto fratecan saluton al laboristaj eksterlandaj gazetoj, kun kiuj estas ligitaj smolenskaj esperantistoj, kaj pli larĝigi kaj profundigi interligon kun eksterlandaj kamaradoj. Dume niaj esperantistoj, gazetlaborantoj kaj laboristkorespondantoj estas ligitaj kun 23 kamaradoj el ok landoj. Por tago de estonta kvarjara jubileo ni havas celon: ĉiu smolenska laboristkorespondanto devas estis ligita kun iu kamarado eksterlanda. Por la lasta celo en Smolensk estas organizita loka oficejo de Internacia Laborista Esperanta Presservo.

*R. Nikolskij.*

## Deklaracio de aŭstra laborista delegitaro pri Sovetio

Sovetlandon vizitis aŭstraj laboristoj. 10. februaron ili forveturis el Moskvo por 6-semajna vojaĝo tra Sovetio. Antaŭ sia forveturo ili transdonis al la redakcio de "Izvestija" jenan deklaracion:

"Aŭstra laborista delegacio forveturas hodiaŭ el Moskvo, sin direktante trans Kievo kaj Ekaterinoslav — Gruzion. La delegacio utiligis sian ĉeeston en Moskvo ne nur por konatiĝi kun laboro en entreprenoj, sed ankaŭ por pli intime kontaktiĝi kun centraj organoj de la rusa frateca profesi-movado.

Impresoj, faritaj al ni per ĉio, kion ni ĝis nun vidis, tute dispelis kalumniajn elpensojn pri soveta Rusio, disvastigitajn en eksterlando.

Ni vidas landon, sin okupantan per socialista konstruado, landon, kie laboristaj masoj, intime kunfanditaj en komuna laboro, forĝas novajn formojn de socia strukturo.

Sciigojn kaj statistikan materialon, kun preteco metitajn en nian disponon de centraj institucioj, ni kontrolis tra entreprenoj kaj per interparoloj kun komunistaj kaj senpartiaj laboristoj, kaj ĉiuj-ĉi sciigoj montriĝis tute veraj.

Precizan kaj detalan raporton pri niaj observoj kaj impresoj en Sovet-Unio ni donos nur post nia reveno el la plua vojaĝo!!

Moskvo, 9. Febr. 1926.

Sekvas 14 subskriboj.

*V. L. 4696.*

## Esperanto kaj senalfabeteco

Rusio estas lando de kontrastoj (malaĵoj) antaŭ nelonge diris iu eminenta persono.

La plej perfekta sociordo — soveta reĝimo, kaj la plej malalta mastrumado de terkulturo.

En Sovetio disvastiĝas esp. — lasta vorto de komprenigilo tekniko, kaj en Sovetio ne tiel facile estas plenumi la deziron, likvidi senalfabetecon.

Sur paĝoj de "Uĉitelskaja Gazeto" — organo de C. K. Unio de klerigadlaborantoj USSR oni pridiskutas la demandon je enkonduko esp. en lernejojn (vidu n-ro 53, 73, 77) kaj sama gazeto en n-ro 79 komunikas pri unu loko, kiu estas mil verstojn (versto — preskaŭ 1 kilometro) de Irkutsk (Sibirio) kun 8000 enloĝantoj, inter kiuj estis nur unu, kiu povis iom legi kaj skribi kaj nun ĉi homo mortis; aliaj tute estas senalfabetuloj. Tamen malaĵoj estas pli esperplenaj ol nivelaĵoj ekz. Germanio, kie preskaŭ ĉiuj legas kaj skribas, bone komprenas esp., sed kie superregas politika analfabeteco.

*SAT-ano 3409.*

## La vagulo

Simpla, sensignifa vagulo. Laŭ profesio — tajloro. Harojn li havas blankaj kiel lakto. Li partoprenis la mondmiliton suferas pro reŭmatismo, edzinon entombigis antaŭ dekkvin jaroj. Multfoje punita, sen loĝejo, sen okupo, li vagas, petas almozon ofte eĉ donacitan panon li ne havas sufiĉe por satmanĝi. Estas malpermesite al li reveni la ĉefurbon, kaj la polico donas al li mizeran ateston.

La 18. februaro li estis surprizita de policisto, ĵus kiam li estis etendanta manon, por pli detale provrigardi la pomojn en korbo antaŭ negocista butiko. Du jam trovis azilon en lia poŝo, kaj la tria ĵus estis sekvonta la saman vojon. Maldikiĝinta malvarmiĝinta, malsata li estis. Li kontraŭstaris la policiston, kiu lin faligis teren, arestis kaj forkondukis.

La 2. aprilo li estis juĝata. Ŝtelo kaj kontraŭagado al policisto kaj reveno en ĉefurbon. Ne eĉ unu vorton li diris por defendi sin. Nek tion, li diris, ke tiam li ne havas eĉ peceton da pano en sendenta buŝo dum kelkaj tagoj, ke li malsatas kaj pro malsato li ŝtelis tiujn tri pomojn, la malsato, estis la kaŭzo, pro kiu li piedire remigris al la ĉefurbo, en la trompema espero, ke en granda urbo pli versimile oni kompatos lin kaj simpatios pro lia kompatinda kaj kaduka korpo. Oni ne kompatis, ne simpatiis.

Li ne malbenas. Inerta li estas al si eĉ al aliuloj. Nur la morton kompateman li atendas.

La vagulo, porcio de homviando, mizero kaj doloro kaj tamen antaŭ jaroj plene da suno kaj forto, la mastroj lin ŝatis pro lia lerteco. Kaj hodiaŭ? Korpo kaduka spirite inerta — plorinde. Du monatojn li ricevis — salajro por tutviva laboro...

El Rudé Práva (Ruĝa Rajto), Praha *6444.*

## Saluton al bulgarinoj!

Tiu-ĉi letero estas skribita de malbone alfabeta rusa kamparanino, kiu, ne povante mem pro diversaj kaŭzoj lerni esperanton, tamen sen iuj diskutoj, kredante utilecon kaj uzeblecon de la lingvo internacia, petis smolenskajn esperantistojn, ke ili per ia-ajn maniero igu ŝian leteron legebla por bulgarinoj.

Varmegan saluton al la laboristinoj kaj kamparaninoj bulgaraj. Mi, libera kaj plenrajta civitanino de Sovet-Unio, de Smolenska guberio (regiono), Gĵatska uezdo (distrikto), salutas vin je nomo de virinoj de Miŝinskaja volostj' (rajono) kaj mi deziras al vi plenrajtiĝi same, kiel ni virinoj de Sovet-Unio. Konante bone la staton de bulgara virino, ĉar mi mem laŭ la naskiĝdeveno estas bulgarino, kaj komparante tiun-ĉi staton kun la stato de virino rusa, mi sentas min devigita kompati vin, karaj kamaradinoj—virinoj. Sed ni, virinoj de Sovet-Unio esperas, ke vi malproksiman estontan tempon estiĝos same plenrajtaj, kiel ni, ke vi havigos al vi la egalrajtecon, kiu apartenas al vi, sed nur dank' al "favoraj" regantoj vi ĝin ne ricevas, ĉar ĝi por ili ne estas profitdona. Nur la soveta registaro bone komprenis ĉi-tion kaj donis al ni kune kun viroj nian civitanan rajtaron. Kaj ni, virinoj rusaj, scipovos pruvi, ke ne senutile oni donis al ni la rajtojn.

Ankoraŭ foje mi salutas vin je nomo de ĉiuj virinoj de Miŝinskaja volostj' kaj mi deziras al vi plenan sukceson en liberiĝo de ekspluatantoj kaj unuigo de virinoj-laboristinoj kaj kamparanoj ĉirkaŭ la proletariaro por komuna batalo kontraŭ premegantoj, por plifirmigo de internacia laborista ligo diverslanda, por garantii sukceson de proletaria revolucio. Vivu libera kaj egalrajta virino! Vivu ŝia liberiginto! Vivu la mondrevolucio! *Marija Ivanova*

(Smolensk. gub., Gĵatskij uezdo, vilaĝo Aljenkino).

## Ĝustigo

En "Sennaciulo" n-o 26 (78) en la artikolo "Ligo de nacioj kaj pacemo" — k-do "SAT 3409" faris skriberaron, kiu povas okazigi gravan miskomprenon:

Li donis sumon de *ĝeneralaj elspezoj* de USSR. en la j. 1925 = 998972500 rbl. kaj sumon de *militelspezoj* dum la sama periodo = 407247000 rbl. kaj el tiuj du ciferoj li konkludis, ke *preskaŭ duono* de ĉiuj elspezoj en Sovetio estas uzataj por la armeo.

*Tio ne estas vera,* ĉar efektiva sumo de ĝeneralaj elspezoj estas ne 998972500 rbl., sed 1998972500 rbl.

Tio ŝanĝas la tutan bildon: *Malpli ol kvarono* (sed eĉ ne duono) de ĉiuj elspezoj en Sovetio estas uzataj por la armeoj.

Mi proponas al k-do, estonte pli ĝuste reskribadi la ciferojn, ĉar iufoje eĉ la "unuoj" multe signifas, precipe, se ĝi signifas unu miliardon. *3717.*

## La tervizito de Jesuo dum la Unua de Majo

*de Sao* (Fino)

Tiam ni eniris regionon, kiu montris gigantajn konstruaĵojn — fabrikojn kaj multajn ferstangajn turojn — minejojn. Kaj ĉi tie ni vidis grandegan amason da homoj en bluaj vestoj. Kalaj manoj tenis ne trikolorajn sed ruĝajn standardojn. Energie, senkompate aspektis la vizaĝoj. Tiu bildo rememorigis nin pri jam viditaj etaj grupoj samspecaj en aliaj regionoj. Jesuo tuj alpaŝis al unu el la homoj: "Amiko, diru al mi kiaj vi estas?" La homo turnis sin al ni: "Ni estas la proletaro" fiere sonis "kaj hodiaŭ ne nur ni, sed ĉiuj proletoj sur la terglobo festas la Unuan de Majo, ne eligante vivu-kriojn pri iu propra patrio aŭ iu aparta standardo. Ni havas nur unu patrion — la mondon kaj unu standardon — la ruĝan." "Kaj kion vi volas?" esploris Jesuo. "Justecon, liberecon kaj ke ĉiu laboru! Ekĉesu estadi riĉeco apud mizero." La saman, kion ankaŭ mi volis en Palestino" murmuris Jesuo. "Ne plu ekzistu potencaj riĉuloj, kiuj elsuĉas la mizerularon", daŭrigis la blubluzulo. "Pro ili, kiuj ne seminte tamen konstante rikoltas, multaj devas suferi. Rigardu jen la nude-krudan domegon — malliberejo en kiun oni ŝovas la ribelantojn — justemulojn. Rigardu la bordelon, kunvenejo de hominoj malindigitaj de tiuj, kiuj indignas pri ili. Rigardu la minejojn, la fabrikojn — ni konstruis ĉion, ni proletoj kaj nia kompenso: malsato, sklaveco, mallibereco." "Ĝuste tiel, kiel en Jeruzalemo miatempe" konkludis Jesuo flustre. Laŭte li demandis: "Kaj kiel vi volas ŝanĝi tion? Ĉu vi obeas la biblion?" "Jen, la biblio kaj jen kiel ni volas ŝanĝi tion," la proleto respondis kaj doninte libreton montris al Jesuo certan linion. La difilo legis: "Ni deklaras malkaŝe, ke niaj celoj povas esti atingitaj nur per la perforta renverso . . ." "For la perforton!" Jesuo milde deklaris. "Beataj estas la pacemuloj, beataj estas la pardonemuloj. Amu viajn malamik — — —" "Malbenataj friponoj, malaperu, tuj tuj!" Policisto alkuregis batante ĉiun dorson atingeblan. "Pri ĉio venkas la Amo!" elvokis Jesuo kaj paŝis policiston: "amiko mia, eningigu cian glavon, ni estas fratoj do ni estu tiaj!" "Kion? Fratoj?" la policisto furioze kriis. Li levis la sabron kaj mi jam opiniis Jesuon batata kiam mi subite sentis en miaj manoj la ŝnuregon. Ankaŭ Jesuo jam kaptis ĝin kaj tuj ni leviĝis for de la tero . . .

En alto de 30—40 metroj ni, turninte niajn rigardojn teren observis ĉie, en ĉiu lando proletojn, kiel klarigis tiu, kiun Jesuo demandis. Ĉiuj tenis sangeruĝajn flagojn. Kaj la flagoj flirtis, flirtegis kaj super la terglobo ili kuniĝis formante gigantan flamegon. Eĉ nin atingis la ardaj langoj kaj el sub ili eksonis krio, potenca, venkscia: "Vivu la unua de Majo!" Ĵure aldoniĝis: "Ni kreos la eternan majon!" Tiam sekvis sono premata, kvazaŭ elinfera: "Liberecon, liberecon!" kaj minace, tondre "Li—ber—econ!" De malproksime kuraĝige venis responda voko: "Faru tiel, kiel ni" kaj mi kredas la voko estis el oriento. "Ili ne plu bezonas min" diris Jesuo malaperante.

Mi, ne plu kapabla teni min, refalis teren kaj — revekiĝis, trovante min sur mia seĝo, tenante la fadenon en mia mano . . .

Sed nun mi rapidis pretigi la flagon por ne malfruiĝi. Atinginte la straton mi rimarkis, ke mi sonĝe jam vidis tion, kio efektive okazas. Ĉie klopodis proletoj kun ruĝaj flagoj atingi la renkontejojn por partopreni la majan manifestadon. Tra la aero alondis al miaj oreloj proleta maj-kanto:

Hodiaŭ laboras neniu —
Ni homan indecon akiru,
Kaj tiun-ĉi tagon por festo elektu
Kaj pezajn katenojn disŝiru.

Tio multe kuraĝigis min, ĉar mi denove ekkonis, ke la proletaj aspiroj jam tute ne estas sonĝoj, sed ili enpaŝis en la seniluzian vojon kundukantan al realeco.

## Dua kongreso de britaj SAT-anoj en Sheffield

(3. Aprilo 1926)

Jenaj lokoj estis reprezentitaj: Sheffield, London, Manchester, Altrincham, Salford, Leeds, Nelson kaj Stockport.

Prezidanto: k-do Elder (Manchester).

Sekretario: k-dino France (Manchester).

Post kantado de "Ruĝa Marŝo" malfermiĝis la kongreso. La prezidanto bonvenigis la konferencanojn kaj atentigis, ke laŭ la multnombro de la ĉeestantoj ĉi-jare SAT evidente propresas en Britio.

*Salut-rezolucio al Tutmondo*

"Ĉi-tiu kongreso, reprezentante la SAT-anaron en Grand-Britio sendas fratajn salutojn al la tutmonda laboristaro, batalanta kontraŭ la kapitalista sistemo. Precipe ĝi sendas vorton kuraĝan al tiuj, kiuj suferas (enkalkulante SAT-anojn) pro la registara subpremo — kaj antaŭvidas la tagon, kiam estos unu partio, unu lingvo, unu klaso."

Laboristoj el la tuta mondo unuiĝu!

Nun okazis prelegoj kaj diskutoj, kiuj unuanime estis aprobitaj.

*Pri rumana subpremo*

Generala Rezolucio de k-do Mc. Ginley (Manchester):

"Ĉi- kongreso, reprezentante la organizitajn proletajn esp-istojn de Grand-Britio rigardas kun naŭzo kaj indigno la agadon de UEA, denuncanta niajn gek-dojn en Rumanio, tiele kaŭzanta iliajn enkarcerigojn; atentigas UEA pri la diferenco inter iliaj neŭtralecaj pretendoj kaj perforta klasagado, kaj registras sian determinon daŭrigi la uzadon de Esperanto por la klaso laborista ĝis la fina likvidado de la kapitalista sistemo." (Rezolucio unuanime aprobita.)

Por la proksima kongreso kaj konsilantaro estas elektitaj: k-do Elder, k-do Mc. Ginley, k-dino France, k-dino Maj Dunn, k-do Rosenbloom kaj k-do Sheldon.

Jenajn temojn oni ankoraŭ pritraktis: Pri dualaj oficoj — SAT kaj fremdaj neŭtralaj organizaĵoj. Pri Sennaciisma Edukado.

La prezidanto fermis la kongreson, dankante al la ĉeestantoj por la bona sukceso. La kongreso fermiĝis per kantado de "La Internacio".

*France.*

*Noto de Redakcio.* Ĉar tiu raporto estis tro ampleksa kaj detala, ni prezentas ĝin nur en mallongigita formo.

## *EKSTER NI*

*Dio mia? Ĉu estas eble? . . .*

*Ĉu vere la esperanta movado estas en danĝero? Ĉu ne prefere kredi, ke la gazeto "Heroldo" fuŝraportis? Apenaŭ kredebla estas la jena diro de iu partoprenінto de la Lokarna Konferenco, lastatempe okazinta:*

*"S-ro Balkányi tre interese raportas pri la gravaj progresoj de Esperanto en laboristaj rondoj. Ni havas la devon ĉiel helpi tiun specialan kampon, kiu eble iam savos nian aferon."*

*Karaj legantoj, ĉu vi bone komprenis? Se la laboristoj devas savi la esperantan aferon, tio ja signifas, ke ĝi estas en danĝero, ĉu ne? Ne povas esti dubo pri tio.*

*Kio do okazis? Ĉu la "interna ideo" forbloviĝis? Ĉu la "Lokarna spirito", tiom laŭdata antaŭ kelka tempo kaj jam forvelkinta post la lasta kunsido de la Ligo de Nacioj, ankaŭ montris sian senefikecon en la esperanta neŭtrala movado?*

*Ege maltrankviliga situacio! . . .*

*Kaj la tuta esperantistaro estas lasita en granda nescio. La laboroj de la konferenco restas ja kovritaj per densa nebulo. Preskaŭ ĉio okazis "konfidencie" . . .*

*— ? . . .*

*— Vi dubas. Do legu:*

*"Pro speciala peto de C. K. ni devas ellasi la ĉefajn partojn de la protokolo pro konfidencia karaktero de la propagandaj aferoj diskutitaj." (Noto de la Red. de "Heroldo".)*

*Almenaŭ ni tre danku al s-ro Balkányi, ke li vokis al la eminentuloj de la esperanta movado pri helpo al la laboristoj.*

*Espereble, de nun, ĉiuj neŭtralaj gazetoj reklamados por SAT; ĉiuj neŭtraluloj aĉetos niajn librojn kaj parto el la subvencioj ricevataj venos en la kason de nia Administranto. . .*

*Pri tio dubi ni ne povas, ĉu ne?*

*Kaj tiam kreskos kaj firmiĝos la sennacieca esp. movado, la sola, kiu efektive povas sukcese kaj definitive altrudi al la mondo sennaciecan lingvon.* Eŭtrapel

## Sennacieca Asocio Tutmonda

*Asocia Sidejo: 23 Rue Boyer, Paris-XXe*
*Adm. Sekretariejo: Lerchner, Colmstrasse 1, Leipzig O 27 — poŝtĉeka n-ro 6835*

**Celo:** *Utiligi praktike la internacian lingvon Esperanto, por la klasaj celoj de la laboristaro tutmonda (vidi la Statuton).*

## OFICIALA INFORMILO

### EKZEKUTIVA KOMISIONO

**De nun, oni adresu ĉion, kio koncernas E. K. kaj D. K. al**

**K-do Glodeau, 23 rue Boyer, Paris XX,**

**la poŝtmandatojn, ĉekojn ktp. oni tekstu ankaŭ je tiu nomo kaj adreso.**

---

### ELDONFAKO DE SAT

Nia legantaro jam scias, ke de longe ni planas la eldonon de "Etiko", unu el la plej valoraj verkoj de Kropotkin. Ni ja estis konvinkitaj, ke tia eldono ne nur montrus la forton de SAT, sed ankaŭ, ke la temo pritraktita de la mondfama kaj de ĉiuj respektata mortinta revoluciulo estas aparte interesa kaj studinda de ĉiuj senescepte SAT-anoj.

Tial senŝanceliĝe ni decidis fari tiun gravan elpaŝon. La eldono de 240 (eble 262) — paĝa volumo estas ja grava entrepreno, konsidere nian modestan buĝeton. Precipe, se oni memoras, ke la diversaj alvokoj, kinjn ni faris por kolektado de mono por la eldono de "Etiko" restis preskaŭ senefikaj. Ni ja kolektis sumon malgrandan kompare je la kosto de la presado.

Sed eble la k-doj ne partoprenis la monkolektadon, tial ke ili dubis pri efektiviĝo de la plano. Se tiel estas, nun ili ne plu havas motivon por dubi. Ni ja sciigas, ke la manuskripto estas jam en la manoj de la presisto. Komencita estas la kompostado. Post du monatoj, la volumo estos presata kaj liverebla al la mendantoj.

Baldaŭ ni informos pri vendkondiĉoj de "Etiko".

---

Nova eldono de

**LINGVAJ RESPONDOJ**

**de Dr. Zamenhof**

Plena kolekto de la lingvaj respondoj de Dr. Zamenhof, aperintaj en "La Esperantisto", "La Revuo", "La Oficiala Gazeto" kaj aliaj

Formato 15×21 cm, 94 paĝoj
Prezo inkl. afranko 1.50 mk. g.
sur luksa papero . . 2.25 „ „

**Administracio de SAT**
**R. Lerchner, Leipzig O 27, Colmstrasse 1**




**SAT-POŜTKARTOJ**

blanka kartono kun verda surskribo de nia asocia titolo

Po 100 kostas 1.— mk. germ.
Po 25 kostas 0,30 mk. germ.
plus 10% por afrank-elspezoj

**Richard Lerchner, Leipzig O 27**
**Colmstrasse 1** — Poŝtĉek-Konto 6835

Nova eldono! **KABE** Nova eldono!

**Vortaro de Esperanto**

**(Esperanto-Esperanta)**

*

Form. 15×21 cm, 184 paĝ., bindita
Prezo inkl. afranko 2.50 mk. germ.

*

**Administracio de SAT**
**R. Lerchner, Leipzig O 27, Colmstrasse 1**

Presejo: UNS-PRODUKTIVGENOSSENSCHAFT, LEIPZIG